**La 56a ILEI-KONGRESO**

**Tempo**: Ekde la 5-a ĝis la12-a de aŭgusto 2023

**Loko**: Linjano Orsabla (Itale: *Lignano Sabbiadoro*), Italio

**Ĉef-temo de la Kongreso:** "Instrui Esperanton en lernejoj"

**Retejo de la Kongreso**: https://2023.kongreso.org/

Post tri sinsekvaj nur-virtualaj Kongresoj, en 2023 la 56-a Kongreso de ILEI denove okazos ankaŭ en ĉeesta medio en la belega urbo Lignano Sabbiadoro en Italio, en la strandurbo Linjano Orsabla (itale: Lignano Sabbiadoro) situanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa Kongresejo, kiu permesos al ĉiuj kongresanoj loĝi, manĝi, labori, kaj ankaŭ ferii en la sama feria vilaĝo.

La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al la kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon, plurajn altrangajn ekipitajn sportajn spacojn ĉu kovritajn ĉu malfermajn.

La ĉefa temo de la Kongreso estos: "Instrui Esperanton en lernejoj". La kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin al la temo, ĉu profesie, ĉu ne.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuaĵojn ĉu pri la kongresa temo, ĉu pri aliaj pedagogiaj temoj, ĉu por la Lingva Festivalo, aŭ por la Internacia Vespero, ktp. Vi povas indiki pri viaj ofertoj kaj kontribuaĵoj kaj en la Aliĝilo kaj per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendo de la proponataj kontribuaĵoj estas la 31-a de januaro 2023, por ke ili certe estu aldonita al la provizora programo de la Kongreso. Por ĉiu via kontribuaĵo, ĉu prelego aŭ ali-speca kontribuaĵo, bonvolu sendi al ni ( ilei.kongresoj@gmail.com ):

- titolon de la kontribuaĵo
- vian kompletan nomon
- daŭron de la prezentado
- ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete
- du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo
- du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi
- vian foton

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn, ktp.

Vi trovos ĉiujn detalojn pri aliĝo en la kongresa retejo: "2023.kongreso.org"

BONVOLU MEMORI, KE LA MALPLEJKOSTA ALIĜKOTIZO VALIDAS ĜIS LA 31-A DE DECEMBRO 2022. DO BONVOLU TUJ ALIĜI POR NE ATENDI LA DUAN PERIODON DE LA KOTIZO.

Laura Brazzabeni

ILEI-Estrarano pri kongresoj